

## Malfermo de la kongreso kaj enkonduko al la temoj (Giovanni Daminelli)

Por enkonduki la temojn de nia kunveno, mi startos de la Katedralo de Milano. Rigardante la Katedralo ni rimarkas sur ĝia fasado kvin bronzaĵajn pordojn. La unua pordo maldekstre estas nomata "Pordo de la Edikto de Milano", konata ankaŭ kiel "Edikto de Toleremo". Ni rigardu ĝin detale.



*Katedralo de Milano*

Ĝia desegno estas disigita en pluraj paneloj kun bronzaĵaj barilefoj.

[1] Ĉe la bazo estas la portretoj de la ses Episkopoj de la diocezo de Milano antaŭ la Edikto

**(Anathalo, Caius, Castrilianus;  
Calimerus, Mona kaj Mirocles).**

[2] Centre de la supra trabo estas la statuo de la imperiestro Konstanteno.

[3] La du vicoj de la centraj paneloj montras dek bildojn pri la mortigo de Sanktuloj martirigitaj antaŭ la Edikto,

**(Nazarus, Celsius; Sebastianus, Victor;  
Felix, Nabor; Gervasius, Protasius;  
Sofia kaj siaj filinoj: Agape, Pistis kaj Elpis).**


Preskaŭ ĉiuj estis martirigitaj en Milano ekcepte *Sebastianus* mortigita en Romo, sed li estis milanano, kaj Sofia, kun siaj tri filinoj, kiu tamen estas ligita al la nomo de Konstanteno, ĉar li konstruigis en Konstantinopolo la Bazilikon de Sankta Sofia.

La dek flankaj paneloj montras:

[4] sube 4 epizodojn de la vivo antaŭ la Edikto,

[5] supre 4 epizodojn de la vivo post la Edikto,

[6] centre resuman frazon de la Edikto kun la du imperiestroj Konstanteno kaj Licinjo.



*Pordo de la Edikto de Milano*

Ni vidu la du panelojn de la Edikto de Milano. Maldestre estas la portreto de Konstanteno kaj dekstre estas la portreto de Licinjo. Inter ili, du tabuloj montras la kernon de la Edikto.



*Detalo pri la Edikto de Milano*

En la maldekstra oni legas:

*Renkontiĝinte en Milano,  
mi Konstanteno Aŭgusto  
kaj mi Licinjo Aŭgusto  
juĝis, ke,  
inter ĉiuj faroj utilaj al la homoj  
kaj respektemaj al la diaĵo,  
antaŭ ĉio necesas plenumi ĉi tion:*



*Maldekstra tabulo kun Konstanteno*

La dekstra la skribaĵo daŭrigas tiele:

*Doni al Kristanoj kaj al ĉiuj  
plenan liberon,  
ke ĉiu rajtu praktiki la religion  
kiun li volas, por ke tio,  
kio estas dieca en la ciela sidejo,  
sin turnu al ni kaj al ĉiuj niaj regnantoj  
pacigita kaj favora.*

*[Edikto 313]*



*Dekstra tabulo kun Licinjo*

De tiam, ĉesis la persekutoj kontraŭ la kristanoj en la Romia Imperio.

Ĉi tiu edikto estas grava, ĉar de ĝi ekas la libereco de la moderna homo.

Sed,  
ni rigardu detale la portreto de la Episkopo Castrilianus:



*Bazo de la pordo kun la episkopo Castrilianus*



Li havas sul la genuoj rubandon kun la nomo de la verkisto de la pordo, la skulptisto Arrigo Minerbi kaj estas indikitaj du jaroj: 1936 kaj 1947. La unua estas la jaro en kiu oni mendis la li la pordon, la dua estas la jaro en kiu li finis sian laboron.

Kial pasis dek unu jarojn?  
Ĉu vere li devis labori dek unu jarojn por realigi sian verkon?

Vere la kialo estas, ke li estis hebreo kaj pro la raciaj leĝoj de la jaro 1938 li devis forlasi sian laboron kaj repreni ĝin nur post la milito.

Ŝajnas ke la verkisto, iom ironie, enskribis la du datojn por montri la kontraston inter la Edikto de Toleremo, kies celebron oni mendis al li, kaj maltoleremo de la realo, kiun li mem devis suferi.

Fakte la persekutoj kontraŭ la fideluloj, ne finiĝis kun tiu edikto, sed ili daŭras ĝis nun.

Pro tio nia kunveno dauros tiamaniere:

Unue Ida Bossi, parolos pri la Fido (la unua temo de nia kunveno).

Poste ŝi parolos pri la martiroj pro la fido en la unuaj tempoj de la Eklezio.

Posttagmeze, mi parolos pri la Bapto, kiu estas la momento, en kiu ni naskiĝas en la Fido.

Poste Ida Bossi parolos pro la nuntempaj martiroj,

sekve Tiziana Fossati pri la lokoj de la fido en la ĉirkaŭaĵoj,

kaj Gianni Conti pri la domo de la Milananoj (t.e. ilia Katedralo)

Lundon matene antaŭvide de la posttagmeza ekskurso Norma Cescotti parolos pri papo Johano la 23a kies naskiĝdomo ni vizitos, kaj Carlo Sarandrea pri Leonardo da Vinci, sur kies pramo ni trairos la riveron Adda por atingi la Sanktejon "Modono de la Arbaro"



*Castrilianus*



*Subskribo de la skulptisto Arrigo Minerbi*



*La du datoj: MCMXXXVI + MCMXLVII*

[www.ucei.it](http://www.ucei.it)